

Matthias Claudius,
Vinkanto de Rejn'

tradukita de Ludwig Emil Meier

1. Ornamu per foliaĵo la pokalon,
Trinkmalplenigu ĝin!
Eŭropo ne enhavas plue valon
Kun same bona vin'!
2. Nek Hungaruj', Polujo ĝin kreskigas,
Nek frankolanda ter',
Ni ne bezonas tiujn, nin ĝojigas
De l'Rejno la vinber'.
3. La patrolando ĝin produktas nia,
Pro tio gustas ĝi
Dolĉege, sed per forto energia
Efikas ĝi en ni.
4. Ne ĉie en germana lando tiu
Vinego kreskas, ne!
Ekzistas kelka regiono, kiu
Ne konas vinon, - ve!
5. Ekzemple, turingia la montaro
Produktas beron - ho!
Ŝajnvino estas ĝi nur, la barbaro
Ĝin kore ĝuu do!
6. Nek en la Erzgebirge ajn troviĝas
Bonvino, nur metal'
En ĝiaj krudaj montoj produktiĝas
Kaj akvo en la val'.
7. Sur Blocksberg, bonkonata sorĉistejo,
Nur blovas akra vent',
Per ĝi alflugas el la diablejo
Megera kontingent'!
8. Ĉe Rejno nur kreskadas vin vino,
Benata estu ĝi!
Ĉe l'bordoj ĝin ja kreis la destino,
Por ke ĝojegu ni!

...

9. Nu, trinku kaj ĝojadu kun bonkoro,
Ho vivu Rejna vin'!
Ĝi dum malĝoja iu ajn vivhoru
Rekuraĝigu nin!

*Traduko de la Germana poemo "Rheinweinlied" de MATTHIAS CLAUDIUS (*1740-08-15 – †1815-01-21) en Esperanton de LUDWIG EMIL MEIER (*1847-02-16 – †1919) en 1907.*

Arg-393-775 (2007-03-25 06:55:31)

La esperantigon mi trovis en la kant-libreto "Esperantista kantaro", kolekto unua: Germanaj kantoj popolaj kaj studentaj, Esperantigitaj de L. E. Meier, verkisto. La kantlibro estas eldonita en 1907 de la eldonejo Hans Theodor Hoffman, Berlin W 35, Steglitzer Straße 44.